



# BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO


Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Numero 2 • Marto/Aprilo 1963

## TIUN JARON AL BRITIO

La Internacia Federacio Esperantista Fervoja (IFEFF) okazigos la 15an kongreson de la 11a ĝis la 17a de majo 1963 en Stoke-on-Trent (graflando Stafford). Al la plej multaj vizitontoj tiu angla urbo de 271000 enloĝantoj estas nekonata. Ĝi situas proksimume 330 km nordokcidente de

London. Stoke-on-Trent estas la nomo de la urbo, kaj Stoke-upon-Trent nomiĝas tiu parto de la urbo, kiu antaŭe estis la ĉefurbo de Stoke-upon-Trent. Ĝi ricevis la urbajn rajtojn en 1874. Per la kuniĝo en 1910 ĝi fariĝis centro de la komuna estraro. La porcelana fabrikado estas la



La  
pramhaveno  
de  
Ostende



baza industrio. La kongresanoj havos okazon konatigi kun la metio de la potfaristoj. Tia potu ankaŭ prezentos sin kiel kongresemlimo.

La industria karaktero de tiu urbo tamen ne ŝajnas esti malfavora al nia IFEF-kongreso. Dank' al la modela laboro de la LKK sub la gvidado de nia konata s-ano Barks estos disponeblaj la necesaj salonegoj en la urbaj konstruaĵoj. „Kings Hall“ (Reĝa Halo) akceptos la kongresanojn dum balo, interkonatiga vespero kaj manĝoj. La malnova parto de la konstruaĵo datas el la periodo 1834—1836. En la Jubilea Halo okazos la fakprelego. Laŭ la programo ne mankos la tradiciaj ekskursoj, du duontagaj per aŭtobuso dimanĉon kaj mardon kaj la tuttaga per vagonaro al Llandudno en Kimrujo. Plezurigos distraj aranĝoj, ankaŭ por la junularo. Sed detalojn ni petas legi en la oficiala programo. Pro la limigita nombro de disponeblaj litoj en hoteloj baldaŭa aliĝo estas rekomendinda.

Estas utile ankaŭ informi sin iom pri la vivkutimoj de la Britoj. Kelkio estas alia ol ĉe ni kontinentuloj, ekz. la mon- kaj mezursistemo, la maldekstre funkcia trafiko aŭ la sinsekvo de la manĝoj. La brita horaro diferencigas inter la horoj antaŭ kaj post la tagmezo (a. m. resp. p. m.), do ĝi uzas nur 12 anstataŭ 24 horojn. La trajnpasaĝeroj atentu la ŝlositajn vagonpordojn. Ili estas malfermeblaj nur de ekstere. La indiktabuloj en la kursvagonoj estas relative malgrandaj. En la londonaj stacidomoj la taksiaŭtomobiloj, kiuj parte trafikis jam de tridek jaroj, rajtas veturi ĝis la kajo. Entute la Britaj Fervojoj havas konsiderinde ekonomiajn zorgojn. Britio, la lulilo de la lokomotivo, suferas pri malmoderna stoko de lokomotivoj kaj vagonoj kaj pri malprofitdonaj durangaj linioj.

La germanaj kongresanoj havas la elekton

atingi Brition sur pluraj vojoj: tra Nederlando, Belgio kaj Francio. La plej konvena vojo estas tiu tra Belgio (Ostende — Dover). En ĉiu kazo la trapaso de la maro estas necivebla, ĉar la projekto de subtera tunelo ĝis nun ne realiĝis.

Ĉiuj vojoj al Stoke-on-Trent kondukas unue al London. La Londona Esperanto-Klubo aranĝos por la travojaĝontaj kongresanoj rondveturadon tra la urbo. Ĝi okazos vendredon, la 10an de majo je la 12a h. La veturado finiĝos je la 18a h. ĉe la Fred Tallant Hall, la sidejo de la Londona Esperanto-Klubo. La Fred Tallant Hall situas apud la Euston-stacio, de kie ekveturas la vagonaro al Stoke. Post la fino de la rondveturado la partoprenontoj povos aŭ rekte pluvojaĝi al Stoke aŭ resti por partopreni je la 18a horo la internacian kunvenon, kiun aranĝos la Londona Esperanto-Klubo.

LKK intencas aranĝi specialan vagonaron al Stoke la 11an de majo proksimume je la deknua. Pri tio aperos detaloj en la organo de IFEF.

Por ni germanoj sufiĉas la enlanda legitimilo, sed nur konekte kun speciala formularo havebla ĉe ĉiuj vojaĝagentejoj. Pli bone estas la pasporto. Vizo ne necesas.

La 15a kongreso de IFEF certe fariĝos sukcesplena, se ankaŭ ni, la kongresanoj, faros nian eblon. LKK kaj lokaj aŭtoritatoj disponigos dignan kadron. Britio akceptos siajn gastojn per ĝentileco kaj tradicio. Ni ĝojigu niajn tieajn gekolegojn per multnombra partopreno. Ankaŭ laŭ turista vidpunkto Britio estas vizitinda. Malgraŭ sia abunda industrio Britio multloke prezentas sin kvazaŭ kiel granda ĝardeno. Neniu pentos viziti la landon, de kie venis iam la unua lokomotivo kaj ĝia gvidanto al Germanio. Kiu ne ŝatus sidi en majo antaŭ granda kameno tenante tason da teo en la mano? W. B.

## Wissenswertes zum 15. IFEF-Kongress

**Anmeldung:** unmittelbar (ohne Vermittlung von GEFA) an „15. IFEF-Esperanto-kongreso“, 25 Marsstreet, Smallthorne, Stoke-on-Trent (Anglio).

**Anmeldeformular:** mit IFEF-Organ „La Internacia Fervojisto“ bereits verteilt.

**Bezahlung:** unmittelbar (ohne Vermittlung von GEFA) an „ML, 12 Co-operative Wholesale

Society, Bankers, Liverpool Rd, Stoke-on-Trent.

**Devisenbeschränkungen:** keine.

**Fahrausweis:**

a) aktive Bedienstete: internationaler Freifahrtschein bis zum englischen Bestimmungsbahnhof;

b) Angehörige: internationaler

Freifahrtschein bis zum englischen Fährhafen ausgenommen bei Benutzung des britischen Nachtschiffes Hoek van Holland — Harwich. Auf den englischen Strecken 50% Ermäßigung auf Ausweis für Billette zum ermäßigten Fahrpreis.

**Fahrplan:** Verbindungen für die Hinfahrt auf Seite 3.



**Hafengebühr:** auch für Freischeininhaber an Bord zu zahlen.

**Kennkarte:** genügt zur Einreise in England nur in Verbindung mit besonderem beim Reisebüro erhältlichen Formular (Visitor's Card).

**Kongreßdauer:** 11.—17. Mai 1963.

**Kongreßbeitrag:** bis 15. April 38 Schilling, danach 45 Schilling.

**Paß:** nicht erforderlich, jedoch ratsam.

**Umrechnungskurse:**

- 1 Pence (d) = 0,05 DM
- 1 Schilling (s) = 0,57 DM (= 12 Pennies)
- 1 Pfund (£) = 11,30 DM (= 20 Schilling)
- 1 Pfund (lb.) = 454 g

**Visum:** nicht erforderlich, auch nicht für Belgien, Frankreich und Niederlande.

**Vorausbestellung** von Schiffsplätzen (Nachtfahrt) auf der Linie Hoek van Holland — Harwich erforderlich.

**Fahrplan — Hinfahrt**


(unvollständig)

Köln	ab	4.20	9.00	Köln	ab	7.10	18.50
Ostende	an	9.30	14.30	Hoek v. H.	an	10.51	22.37
	ab	10.00	15.00		ab	12.00	23.40
Dover	an	13.30	18.30	Harwich	an	18.20	6.45
	ab	14.10	19.10		ab	19.00	7.50
London	an	15.42	20.35	London	an	20.25	9.13
(Victoria St.)				(Liverpool Str. St.)			

			montags bis freitags						
London	ab	9.50	11.40	11.55	14.25	15.55	17.05	18.30	
(Euston St.)									
Stafford	an		14.12	15.35	17.05		19.49	20.56	
	ab		14.30	15.57	17.20		20.05	21.36	
Stoke-o-T.	an	13.47	15.00	16.27	17.53	19.09	20.33	22.04	

			samstags						
London	ab	6.45	8.30	wie oben ausgenommen			18.50		
(Euston St.)									
Stafford	an	10.35	11.07					*)	
	ab	10.48	11.25						
Stoke-o-T.	an	11.18	11.55					22.47	

			sonntags					
London	ab	10.10	11.00	14.10	17.50			
(Euston St.)								
Stafford	an	13.08	14.28	17.15	21.06			
	ab	14.00	16.00	18.04	21.35			
Stoke-o-T.	an	14.28	16.28	18.33	22.02			



La  
stacidomo  
de  
Ostende



## Ni legis en...

**Bulteno** de la aŭstria sekcio de IFEF dediĉas (en febr.) la frontpaĝon al la 85a naskiĝtago de la vaste konata kortega konsilisto Hugo Steiner. Ankaŭ nia redakcio tutkore gratulas.

**DEFA-Bulteno**, eldonita de la Dana Esperantista Fervojista Asocio, vaste raportas (en marto) pri la 15jara jubileo de DEFA. IFEF-prezidanto de Jong dediĉas kuragiĝajn salutvortojn. Ankaŭ nia redakcio sendas multajn gratulojn.

**El Popola Ĉinio**, nun (en n-ro 1) en pli moderna vestaĵo kaj bone ilustrita kiel kutime, donas superrigardon pri la nuntempa ĉefurbo Peking kaj publikigas bildojn de la stacidoma halo.

**En Esperanto en Skotlando**, eldonita de la Skota Federacio Esperantista, estas (en jan.) nepre leginda la tipe skota poem-o „Tam O' Shantor“.

**Fervojisto**, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, memorigas (en febr.) en sia nekrologo pri la mortinta honorprezidanto Stapel.

**HOMO KAJ KOSMO** nove eldoniĝis en Zagreb de jan. 1963 kiel populara natur-scienca Esperanto-revuo. Se la sekvontaj n-roj, unu po kvaronjaro, daŭrigos la nivelon de la unua, la abono estos rekomendinda. Prezo por jarabono 6.— gm (DM).

**Hungara Fervojista Mondo**, revuo de la fervojista Esperanto-movado en Hungario, demonstras (en n-ro 4) per multaj postkongresaj citaĵoj de eksterlandaj delegitoj kaj organoj la profundan impreson pri la lastjara IFEF-kongreso en Budapeŝto.

**Informa Bulteno — Itala Fervojisto**, organo de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio, aperas jam de 13 jaroj. N-ro 1—2 konigas la multflankan agadon de niaj italaj gekolegoj.

**En La Fervojisto**, organo de la franca IFEF-sekcio, prezentas sin (en marto) la nova estraro. La junularo ŝajnas esti tre aktiva.

**PACO**, organo de la mondpaca esperantista movado, donas same strangan kiel nekontentigan respondon al la demando de leganto, kion komunistaj landoj komprenas sub libera interŝanĝo de ideoj.

**Svisa Fervojisto**, bulteno de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, vaste informas (en febr.) pri „Neue Aufgaben des Esperanto-Weltbundes“ (UEA).

**The Worker Esperantist**, eldonita de la brita laboristaro elĉerpas en (febr.) el la IFEF-organo anglalingvan resumon pri la nova trajntipo „Rheingold“ de la DB.

Por letervespero estas petataj esperantistoj kaj adresoj de korespondemuloj. Adreso: Halmágyi Balázs, Sz. MT. Esperanto-Tanfolyam, Nacincbacika, Jókai tér 1/5 (Hungario).

La Specimena Foiro de Barcelono eldonis duformatan (30 × 40 cm kaj 70 × 100 cm) afiŝon en Esperanto. Interesuloj postulu antaŭ la komenco en junio 1963 unu aŭ plurajn ekzemplerojn de „31a Oficiala kaj Internacia Specimenfoiro, propaganda Fakoj — Pasco de Maua, Christina s/n, Barcelono (Hispanio)“.

S-ano Geroldinger en Linz (Aŭstrio), konata estrarano de la aŭstria Esperanto-movado, ricevis la Aŭstrian Esperanto-Honorinsignon pro liaj meritoj. GEFA kore gratulas.

Bondeziroj pri Kristnasko resp. Novjaro presitajn en Esperantoteksto konekse kun plaĉa bildo liveras „s-ro Pierre Delaire, Centre National Esperanto-Office, 9 Bis, Rue du Commandant-de-Poli, Orléans/Loire (Francio)“.

## Diversaĵoj

**Tra Germanio per la Federacia Fervojo** estas forsendita de nia asocio jam en miloj da ekzempleroj. Dekoj da redakcioj pozitive recenzis la eldonon de tiu fervoja reklamilo. Ĉu vi jam petis kvanton por viaj korespondantoj? Mendu ĉe „Germana Esperanta Fervoja Asocio — sekretariejo —, 6 Frankfurt (M) 9, Karlstr. 4—6“. Germanoj ne petu la prospekton ĉe la eldoninto kaj ne en Esperanto.

Komune kun la loka grupo la distrikto Frankfurt aranĝis la 9an de februaro karnavalan vesperon en la direkcia kantino. Kun iom da peno oni povis rekonigi la konatajn personojn sub maristaj kostumoj. Komuna danco, skeĉo, ŝercludoj kaj karnavala muziko okupis la venintojn de du ĝis okdek-du jaroj plurajn horojn. — La 22an de februaro s-ro Pompilio, la kongressekretario de UEA, montris kolorajn bildojn pri la kongreslando Bulgario kaj seĝis vekli la intereson per sonbendo.

W. B.

## AKTUELLER DENN JE

Drei Milliarden Menschen sprechen über 2000 Sprachen und Dialekte. Aber nur ein Dutzend Sprachen ist international wirklich führend. In der westlichen Welt gilt sogar nur eine Sprache als tonangebend: Englisch.

Die Praxis sieht allerdings anders aus. In vielen internationalen Beziehungen hat Französisch seine führende Rolle bewahrt. Auch unter den Eisenbahnen. Doch Französisch und Englisch allein reichen nicht aus. Im Ausland lernt man eifrig Deutsch, die Deutschen plagen sich mit romanischen und nordischen Sprachen.

Die Welt besteht aber nicht nur aus westlich orientierten Völkern. Handel, Verkehr, Technik, Kultur und Wissenschaft drängen über alle Grenzen.

Wie verständigt man sich? Mit Englisch und Französisch

natürlich. Es heißt doch, damit komme man überall durch.

Wirklich? Und wer ist „man“?

Machen wir uns nichts vor! Die Öffentlichkeit ist zu gerne bereit, das Feld den anderen zu überlassen. Den Privilegierten, die Fremdsprachen lernen können. Den Hochmütigen, die da meinen, internationale Beziehungen gäbe es nur unter sprachgeschulten Spezialisten oder Dolmetschern. Den Sorglosen, die sich auf die Verbreitung ihrer Muttersprache verlassen. Solchen Meinungen begegnen wir oft. Auch unter Eisenbahnern.

Wir sehen in der mangelnden Verständigungsmöglichkeit ein großes Problem. Daher benutzen wir eine Sprache, die leichter zu erlernen ist als jede andere. Eine Sprache, die in unser berufliches und privates Leben paßt. Vielleicht haben Sie diese Internationale Sprache schon immer gesucht. Hier ist sie: ESPERANTO.



# Vizito al Grafenau

Ĉe mia alveno Grafenau, beleta urbeto en la Bavara Arbaro, pompis en pura blanko de la unua novembro neĝo. Kolego Wiesmann, ĵus fininte sian deĵoron, kore bonvenigis min, kaj post kelkminuta marŝado ni atingis lian loĝejon, kie lia ĉarma edzino post ambaŭflankaj salutvortoj gastigeme surtabligis kafon kaj kukon. Mi estis veninta ĉi tien por doni la komencan puŝon al Esperantokurso, kiu, laŭ mia opinio, povos fariĝi la bazo por Esperantogrupoj. Sed kia surprizo por mi — ĝi ne estis la ununura ĉi tiun tagon —, kiam mi eksciis el la konversacio kun miaj gegastigantoj, ke tie jam ekzistas vigla Esp.-grupo, kaj ke eĉ sep Esperantistoj, inter

ili kvar fervojistoj, estis partoprenintaj nian IFEF-kongreson en Budapeŝto.

Poste s-ano Wiesmann akompanis min al la gastejo Nätscher, kie li estis mendinta por mi ĉambron, kaj kie — tre agrable por mi — ankaŭ devis okazi la grupkunveno, dum ke ĝenerale ĝi okazas en kunveno de la magistrato. Kol. Wiesmann reiris hejmen por vespermanĝi kaj revenis kune kun sia edzino, ankaŭ Esperantistino, al la kunveno.

Mi apenaŭ havis tempon por iomete refreŝigi min kaj vespermanĝi (mi ne sukcesis tute malplenigi la „malvarman platon“ pro ĝia abundo), kiam jam alvenis la unua partoprenonto de nia

kunveno. Li meritas esti prezentata al niaj gelegantoj pro sia persista esperantisteco sub malfavoraj cirkonstancoj. S-ano Strohmaier, iama poŝtisto kaj nun pli ol sepdekjara, lernis Esperanton aŭtodidakte kiel solulo antaŭ jardekoj en Silezio, korespondadis esperantlingve kaj legis regule E.-periodaĵojn; sed ĝis antaŭ nelonge li neniam havis okazon partopreni E.-kongreson. Oni imagu, kion signifis por ĉi tiu grandaĝulo ĝisvivi ankoraŭ la ekfloradon de E.-movado en sia urbeto. La kulmino de lia esperantista vivo sendube estis lia partopreno en la IFEF-kongreso en Budapeŝto, kion ebligis al li helpema grupano per sia aŭtomobilo. Kvankam de unu jaro loĝante en vilaĝo, distance 10 km. de Grafenau, li ne preterlasas regule viziti la grupkunvenojn.

Interterpe estis kolektiĝintaj en aparta salono, komforte kaj moderne ekipita kiel la tuta gastejo, ĉirkaŭ 16 personoj, inter ili la estro de la ticia popolokleriga asocio kaj la ses komencantoj de la nova E.-kurso. Kolego Wiesmann, bonveniginte per afablaj vortoj aparte la estron de la popolokleriga asocio, la gaston el Frankfurto kaj la ses gekursanojn, malfermis la kunvenon. En sia respondo la estro de la popolokleriga asocio rekonis la gravecon de la lingva problemoj kaj certigis al la grupanoj sian helpemecon en iliaj esperantaj celadoj (forta aplaŭdo). Mi, la frankfurta gasto, dankinte pro la bonvenigaj vortoj, esprimis mian surprizon kaj mian ĝojon pri la modela, celkonscia laboro jam farita de la grupo sub la gvidado de s-ano Wiesmann, kaj akcentis aparte la ĝojigan kaj esperigan faktan, ke la plimulto de la grupanoj estas gejunuloj, kio garantias konstantan kreskon de la grupo Grafenau.

Interterpe estis alveninta la estro de la urba trafikoficejo por preparoli kun s-ano W. kaj mi

## PLI AKTUALA OL IAM

Tri miliardoj da homoj parolas pli ol 2000 lingvojn kaj dialektojn. Sed nur dekeduo da lingvoj estas internacie vere gvidanta. En la okcidenta mondo valoras eĉ nur unu lingvo kiel ĉefa: la angla.

Sed la praktiko aspektas alia. En multaj internaciaj rilatoj la franca lingvo konservis sian gvidan rolon. Ankaŭ inter la fervojoj. Sed la franca kaj angla lingvoj solaj ne sufiĉas. En eksterlando oni lernas diligente la germanan lingvon, la Germanoj klopodas studi romanajn kaj nordajn lingvojn.

Nu, la mondo konsistas ne nur el okcidente pensantaj popoloj. Komerco, trafiko, tekniko, kulturo kaj scienco puŝas trans ĉiujn limojn.

Kiel oni interkompreniĝas? Kompreneble per la angla kaj

franca lingvoj. Laŭdire oni ja komprenigas sin ĉie pere de ili.

Ĉu vere? Kaj kiu estas „oni“?

Ni ne iluziigu nin! Tro volonte la publiko estas preta lasi la agadon al la aliaj. Al la privileguloj, kiuj povas lerni fremdlingvojn. Al la arogantuloj opiniantaj, ke internaciaj ligoj ekzistas nur inter lingvospertaj specialistoj kaj interpretistoj. Al la senzorguloj, kiuj fidas al la distvastiĝo de sia gepatra lingvo. Tiajn opiniojn ni ofte renkontas. Ankaŭ inter fervojistoj.

Ni vidas grandan problemon en la mankanta eblo de la interkompreniĝo. Pro tio ni uzas lingvon, kiu estas lernebla pli facile ol ĉiu alia. Lingvon, kiu konformas al nia profesia kaj privata vivo. Eble vi serĉis jam ĉiam tiun Internacian Lingvon. Jen ĝi estas: ESPERANTO.

W. B.



tekston por tutaĝa reklamo pri Grafenau en la jarlibro de UEA, kio estis ordigita post kelkminuta interkonsiliĝo.

Por profiti el mia ĉeesto kol. W. nun „insistis“ pri provleciono por la komencantoj, kiuj lernas nian lingvon laŭ la leterkurso de la „Briefschule“ en Frankfurt (kies dua eldono, cetere, jam estas en preparo), tasko, kiun mi volonte kaj plezure plenumis, ĉar ĉiuj atenteme kaj interesigite partoprenis.

Dezirante al ĉiuj ĉeestantoj ankoraŭ horeton de ĝojo kaj gajeco, kol. W. transiris al senceremonia parto. Jes, gajeco ne mankis; mi nur malofte tiom ridegis, ekz., kiam oni aludis travivaĵojn el la budapeŝta kongreso ktp. La plej gaja kaj la plej vigla el inter ĉiuj sendube estis nia maljuna s-ano Strohmaier. Sed ne ĉiam mi komprenis la grafenauanojn, nome, se ili deglitis en sian dialekton, kaj mi interrompis: „Laŭ mi vi nun parolas ‚hispane‘, bonvolu traduki esperantlingven!“

Kio, kompreneble, ne malpligrandigis la gajecon. Estis preskaŭ noktomeze, kiam ni adiaŭis kaj disiĝis; mi, plena de bonaj impresoj (kaj

— sincere dirite — da milda, bongusta biero!).

La atenta leganto certe jam rimarkis, kial mi iom detale raportis pri mia vizito en Grafenau. Jen, celkonscia laboro de kolego, modesta homo, kiu kapablis ne nur starigi viglan E.-grupon, sed ankaŭ interesigi la lokajn eminentulojn por niaj celoj, kiel estas la estroj de la popolokleriga asocio kaj de la trafikoficejo, la lernejestro (kiu disponigas klasĉambrojn por la unua kurso, la urbestro kaj eĉ la subdistriktestro: ĉiuj favoras Esperanton) aŭ almenaŭ pretas subteni la laboron de la loka grupo. Pro tio nia kolego Wiesmann meritas dankon kaj rekonon pro sia sukcesplena, modela laboro, kiu atestas pri lia leterco varbi delikatanmaniere, ne sintrudeme kaj evitante sektecon, sed kaptante ĉiun konvenan okazon por akceli nian aferon. Al li kaj al liaj kunlaborantoj, precipe al lia komprenema edzino ĉi-loke ankoraŭfoje mian koran dankon pro la afabla akcepto kaj la agrablaj horoj en amika rondo. Al la kolegantoj mi akلامe rekomendas: Vizitu la belan ferio-lokon Grafenau en la Bavara Arbaro!

D. Jäger

## Nekrologo

Neatendite mortis la 20an de januaro 1963 la honora Prezidanto de IFEF, Walig Stapel el Amsterdam. Li gvidis IFEF de 1947 ĝis 1958. Al li ni ŝuldas la renovigon de IFEF post la milito.

Estis en majo 1951, kiam unuafoje mi renkontis lin en Paris okaze de la 3a IFEF-kongreso. Kun fervoro kaj entuziasmo la tiama IFEF-prezidanto Stapel sciis alparoli la kongresanojn. Simpla kaj modesta homo, ĉiam preta por ŝerco kaj kanto, li ŝercis nek honorojn kaj rekompensojn. Lia celo konstante pligrandigi la nombron de la IFEF-anoj efektiviĝis de jaro al jaro

dum lia prezido. Malgraŭ ofta seniluziigoj li kredis je la valoro de Esperanto sur la tereno de la interpopola amikeco. Plej granda estis lia feliĉo, kiam la IFEF-kongresoj demonstris, ke IFEF estas sur la ĝusta vojo. Dum la 10a IFEF-kongreso en Aarhus li devis transdoni la gvidadon en la manojn de la nuntempa prezidanto de Jong.

Kun IFEF kaj ankaŭ kun nia asocio s-ano Stapel restis en bona harmonio. Nia jarkunveno en Trier (1960) kaj Heidelberg (1961) vidis lin kiel gaston.

La 19an de januaro 1963 GEFA perdis pro morto la fidelan kaj longjaran membron **Andreas**

**Kästl** en la aĝo de nur 45 jaroj. Li esperantistiĝis en 1955 kaj estis fondinto de la fervojista grupo en Weiden/Oberpfalz, en kiu li modele laboris. Ni memorigos lin en estimo kaj danko. W. B.

## Kalendaro por 1963

**Rinteln** gastigos dum la paska liberto en komforta hejmo komencantojn kaj progresintojn por Esperantostudado. Prezo por plena pensio: 6,50 gm (DM). Interesuloj aliĝu tuj al „s-ro Heinrich Müller, 3 Hannover, Mommsenstr. 51“.

La Esperantista Kulturdomo „Kastelo Grésillon“ en **Baugé** (M. et L.), Francio malfermas siajn portojn ekde la paska liberto ĝis meze de septembro. La programon pri la diversaj periodoj kun necesaj informoj oni petu de la nomita adreso.

La Germana Esperanto-Asocio (GEA) aranĝos sian 41an kongreson en **Würzburg** de la 10a ĝis la 13a de majo. Nij kolegoj, kiuj ne povos partopreni la IFEF-kongreson en Britio, estas alvokataj ĉeesti tiun kunvenon. Kotizo: 10,— gm (DM). Aliĝojn akceptas „Esperanto-Gruppe, 87 Würzburg, Huttenstr. 3 (b. Weller)“.

Sennaciaca Asocio Tutmonda (SAT) elektis kiel kongreslokon por 1963 (20.—26. 7.) la havenurbejon **Hamburg**. Aliĝojn oni direktu al „36a SAT-Kongreso, 2 Hamburg-Gr. Flottbek Im Hag 18“.

Antaŭ la UE-kongreso en Bulgario okazos en **Wien** feriosemajno (28. 7.—1. 8.). Kotizo sen tranokto 76.— gm (DM). Aliĝojn akceptas „Organiza komitato de la antaŭkongresa feriosemajno 1963, Wien 15, Fünfhaustr. 14“.

La 48a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1963 en **Sofia** (Bulgario). La riĉa programo kaj la nombro de la aliĝintoj promesas superi la antaŭajn kongresojn. Aliĝo per „Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam—2 (Nederlando)“.

Gasto en familio oni estos dum la feria semajno (11.—19. 8.) en **Krommenie** (Nederlando). Kostoj inkluzive 5 tuttagaj ekskursoj: 60,— nederlandaj guldenoj. Aliĝo plej malfrue ĝis 1. 6. al „s-ino J. A. v. d. Meulen-van Harten, Popelstr. 13, Krommenie (Nederlando)“.

Denove niaj svisaj kolegoj alvokas al Eŭropa FERIA Semajno en **Oberbalmberg** (Kantono Solothurn) de la 1a ĝis la 7a de septembro. Kostoj entute 133.— svisaj frankoj por komuna dormejo. Loĝigo en 1-, 2- aŭ 4-litaj ĉambroj kontraŭ pluspago inter 15 kaj 40 svisaj frankoj. Interesuloj kontaktigu kun „s-ro Hans Hunkeler, poŝtako 417, Aarau (Svislando)“.

Alia internacia feria semajno allogas en **Zwolle** (Nederlando) dum la 14a ĝis la 21a de septembro kun variieca ekskursprogramo. Prezo proks. 90— gm (DM). Adreso: Thies M. Blaauw, Begoniastraat 2, Zwolle (Nederlando).



## Severa vintro superita

Ĉiu el ni travivis dum la lastaj tri monatoj unu el la plej severaj vintroj dum nia epoko. Ĉiu havis siajn personajn zorgojn por konservi la sanecon de si mem kaj de la familio. Krom tio montrigis evidente, en kiu granda amplekso bone funkcia fervejreto kapablas altenteni la ĉiutagan vivon eĉ dum ekstrema vintro.

Sen fanfaroni oni povas diri, ke sen la fervojistoj la germana popolo estus travivinta fiaskon nemezureblan. Kiam la akvovojoj glaciĝis, kiam oleo kaj karbo kaj kompreneble ankaŭ la ceteraj provizoj urĝe bezonis seninterrompitan transporton, estis la fervojistoj pretaj. Egale, ĉu en la montaro (kiel montras nia bildo) la linioj estis liberigendaj de la neĝamasoj aŭ ĉu la trafiko sur la ĉeflinioj estis pligrandigenda, ĉie la fervojo demonstris sin kiel fidinda transportinstrumento. Malfruiĝoj estis necviteblaj, sed la trajnoj rulis. La fervoja administracio parte rekompencis la eksterajn laborantojn per pluspago kaj plusvestaĵoj. La publika opinio, je aliaj tempoj rapide preta por kritikoj, ofte laŭdis la fervojistojn.

Jen kelkaj ciferoj: Sole por karbono estas disponigitaj la 28an

de januaro 1963 45600 vagonoj, en januaro entute 1090500, do je 15% pli multe ol en 1962. Dum nur unu tago estas fortransportitaj el la Ruhr-regiono preskaŭ 500000 tunoj da karbono. Al Frankfurt oni transportis dum duona januaro 31000 tunojn da oleo, en 1962 kontraŭe nur 1100 tunojn. Du el la plejmulte frekventitaj linioj estis tiuj ambaŭflanke de la Rejnrivero. Dum la 21a de decembro 1962 oni nombris 576 trajnoj. Do post ĉiuj kvin minutoj veturis po unu trajno. Poste la trafiko regresis al „nur“ 530 trajnoj potage. La

meznombra kvanto estas 420 kaj dum la somera ĉefsezono 480.

La unua prezidanto de la Germana Federacia Fervojo, prof. d-ro Oeftering, diris iam dum tiu tempo:

„Neniu povas nei, ke dum tiuj tagoj la fervojistoj, kiuj ekstere en terura frostoj kaj neĝo devas sreĉe labori kaj jam delonge ne plu havas regulitan servon, plenumas tute elstarajn farojn en la intereso de niaj klientoj. Sed ili faras tion volonte tiamaniere pruvante denove, ke la germana popolo povas fidi al la Germana Federacia Fervojo ankaŭ dum la plej grandaj malfacilaĵoj.“


W. B.

### Anekdoto Prahajg ekiras por olei

Viro venis al la fervoja funkcioŝejejo en Hamburg-Altona. Li nomiĝis Prahajg, pezis viva du funtoĉentojn kaj havis infanan animon. Ĝis nun li estis servisto kaj li deziris fariĝi fervoja gardisto. Prahajg ricevis oleokruĉon grandforman kun la komisio, iri al la trajoj kaj zorgeme olei ĉiun relbolton. Dum semajnoj oni aŭdis nenion pri li. Jam neniu memoris pri li. Tiam, iutage post naŭ semajnoj kaj du tagoj alvenis telegramo: „Sendu oleon, mi estas en Köln, Prahajg.“

(Trad. de Mester)

Neĝforigistoj  
en  
montara  
linio





## En la malĝusta trajno

„Rapidu, rapidu“, vokis la oficisto en la biletoĝiĉeto, „la trajno tuj ekveturos“.

Mi kaptis miajn du pezajn kofrojn kaj rapidis tra la subtraka tunelo. Alveninte sur la kajo mi eniris la kupeon kaj perforte mi fermis la pordon.

La trajno rulis direkte al la sopirita ferioleko. Vid-al-vide de mi sidis dika viro, kiu fumis cigaron konforman al li. Ni estis alvenintaj en la unua haltejo, kiam la sinjoro demandis „Kien iras la vojaĝo?“

La trajnestro ĵus donis la ordonon por ekveturi. Mi respondis: „Al Memmingen“.

La sinjoro eksaltis, kvazaŭ pinĉita de kankro „Ho, sankta Dio, do mi maltrafas...!“

„Kien vi volas?“

„Al Ansbach.“

„Tutcerte“, mi konfirmis, „vi sidas en la malĝusta trajno.“

Kun rapideco, kiun mi ne estis atendinta de tiu dika viro, li saltis el la kupeo. Tra la fenestro mi transdonis al li liajn du pezajn kofrojn. Poste li malaperis en la

fumo de la ekveturanta lokomotivo, kaj li afable mansignis al mi.

Konvinkite, ke mi agis tre bone, mi denove sidis sur mia sidloko. Post du plujaj haltejoj envenis la trajnestro kaj kontrolis la biletojn.

„Sinjoro“ li deklaris „vi sidas en la malĝusta trajno“.

„Kial?“

„Ĉar tiu trajno veturas al Ansbach.“

(Tradukita el „Sozialblatt“ de E. Kruse)

## Interna disciplino?

En la revuo „Esperanto“, oficiala organo de UEA, de oktobro 1962 aperis la „Dua baza laborplano de UEA“. Per tiu plano oni volas fortigi la Esperantomovadon kaj vastigi ties progresojn survoje al la fina celo. Kiel ĉiu agadplano ankaŭ ĝi konsistas el konsiderinda nombro da programeroj, inter ili la postulo, „nepre atingi pli fortan internan disciplinon“. Kion do signifas tiu frazo, kaj ĉu ĝi havas sencnon ankaŭ por ni, la esperantistaj fakuloj?

La planteksto mem proksimume difinas jene: Ĉiu organo, funkciulo aŭ oficisto plenumu precize, akurate kaj ĝustatempe siajn taskojn kaj devojn, kaj la unuopaj lokaj grupoj kaj individuaj membroj turnu sin unuavice al siaj respektivaj landaj aŭ fakaj asocioj, komitatanoj kaj lokaj organizaĵoj, tiamaniere sensarĝante la centrajn organojn de laboroj, kiuj ne nepre apartenas al ili.

Ju pli granda la organizo, des pli gravaj estas tiaj reguloj. Nia Germana Esperanta Fervojista Asocio ne povas esti nomata „granda“. Tamen ĝi havas membrojn en tuta Germanio kaj taskojn

diversniveleajn kaj diversdirektajn. Kutime tiuj taskoj estas plenumataj de nur relative malmultaj helpemuloj, kiuj ĉiuj estas aktivaj fervojistoj. Ili havas sian profesion, ĉiutagan laboron. Kaj kiu konas la fervojistan deĵoron, tiu ankaŭ konas la daŭre sufiĉe pzan ŝarĝon, kiu rezultigas el ĝi. Ĉiuj tiuj helpemuloj do apude, en sia libera tempo faras tion, kio sumiĝas je la parte videblaj, parte nevideblaj fruktoj de la asocia klopodado. Estas multaj vesperoj, sabatoj, eĉ dimanĉoj, dum kiuj iliaj edzinoj kaj infanoj devas rezigni komunan konversacion, promenadon, manĝadon ktp.

Akurata laborado postulas tempon, ĉiam denove tempon. Kaj jen la punkto, en kiu la interna disciplino povas kaj devas servi al la bonvoluloj de la asocio. Sed kiel? Nu, kelkaj tute simplaj ekzemploj montru tion: La estraranoj ĝustatempe traktu la internajn problemojn de la asocio same kiel tiujn, kiuj koncernas la rilatojn al IFEF, GEA, BSW ktp. La distriktkomisiitoj klopodu, akurate plenumi la direktivojn de la BSW resp. de la estraro kaj laŭeble fari ĉion, kio faciligas ties ampleksajn tas-

kojn. Ili resendu demandilojn je preciza tempo, preparu la membrrolistojn kaj sendu la kotizojn je la fiksita limtempo. Persiste ili instigu la grupojn al simila agado.

La grupestroj estu konsciaj pri tio, ke ili estas eksterordinare gravaj apogiloj de la asocio. De ili multe dependas, ĉu la membronombro kreskas, ĉu la grupoj estas veraj „vivajoj“ aŭ nur „stagnaĵoj“, surpaperaj kreajoj. Ili el si mem donu la impulsojn kaj faciligu al la distriktkomisiitoj ties laboradon, mem laborante en preciza maniero. Ĉiu, ĉu grupestro, ĉu estrarano, estas ero en iom „sentema“ ĉeno. La gvidŝnuro por ili daŭre estu la bono de nia faka asocio. Niaj materiaj rimedoj kaj homaj fortoj estas limigitaj. Pro tio oni fcrigu kaj fortenu de la agemaj personoj ĉiun nenecesan ŝarĝon kaj precipe evitu, kiel ofte okazas, ĉiam denove diskutojn pri jam traktitaj demandoj. Oni fidu ĉi-rilate al la estraro, kiu tuteerte faradas sian plej bonan, sed kompreneble nur laŭ eblecoj, kiuj ofte estas rigore limigitaj. GieBner

Notu jam nun la daton de nia GEFA-jarkunveno:

19/20a de oktobro.

Volu nepre rezervigi tiujn tagojn por via ĉeesto en

REGENSBURG

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Barnickel, 6000 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6. Sekretariat/sekretario: Elfriede Kruse, 6000 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6. Vorsitzender/prezidanto: Joachim Gießner, 3210 Elze/Han., Bahnhof. Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 6250 Limburg/Lahn.